N. N. 11,

# Vaga kanto

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

1. L'antaŭtagmezon tutan mi
Studadis kun fervor',
Nun posttagmezon ĝojos en
Bierejo mia kor'!
Pli frue mi ne lasos ĝin,
Ol vokis la meznokto min.
Viválleraллál-leráллeraллá,
Viválleraлláллeraллá!

2. De l'viv' plej granda ĝojo jen
Do estas am' kaj vin',
De l'amatino ĉirkaŭpren'
Sentigas princo min!
Kaj ĉe hordea suko eĉ
Mi revas laŭ kronita reĝ'!
Viválleraллál-leráллeraллá,
Viválleraлláллeraллá!

3. Ja homo sen de am' inklin'
Nek vinon amantul'
Neniam amikigos min
Nek estos ajn karul'.
Similas vivo tia nur
Malbonan kampon sen kultur'!
Viválleraллál-leráллeraллá,
Viválleraлláллeraллá!

. . .

N. N. 11,

# Studenta kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1. La tutan tagon studis mi
Senpaŭze ĝis vesper'.
Nun dediĉita estu ĝi
Finfine al bier'.
Nur volas iri hejmen mi,
se sonas de l' gardisto kri'.
Viválleraллál-leráллeraллá,
Viválleraлláллeraллá!

2. Plej bela aĵ' en mondo ĉi
Ja estas am' kaj vin',
Brakumas mian inon mi
Kaj sentas princo min.
Mi revas, ke kun reĝa kron'
Mi sidas alte sur la tron'.
Viválleraллál-leráллeraллá,
Viválleraлláллeraллá!

3. Se hom' ne sentas ĉarmon de
La bel' kaj de la vin',
Na ŝatas tiun mi kaj ne
Salutas kore lin.
Egala ŝajnas tiu ĉi
Al malfekunda kamp' al mi.
Viválleraллál-leráллeraллá,
Viválleraлláллeraллá!

. . .

4. Jam ofte pensis mi, pro ĉiel'!
Ke de l'Kreinto do
Pri soifo estas la kamel'
Tre favorata, ho!
Barelon kiel ventro ĝi
Enhavas per naturmagi'!
Vivállerallál-lerállerallá,
Viválleralláll erallá!

5. Ĉu - kien mia - scias vi -
Kompreno iris for?
Ebrie sentas preskaŭ mi,
Batadas mia kor'.
Okulo surda, muta naz',
Senvida lango - stranga kaz'!
Vivállerallál-lerállerallá,
Viválleralláll erallá!

6. Ho, mastro, unu glason nur,
Enverŝu sen envi'!
La ŝuldon skribu al la mur',
Jen mia garanti':
Por la pruntita biero ĉi
Prezentas mian ĉapon mi!
Vivállerallál-lerállerallá,
Viválleralláll erallá!

...

4. Jam ofte mi - ĉe la ĉiel' -
Pensadis pri l' kamel':
Komforton havas tiu ĉi;
Ĉar portos ĝi en si
Barelon, se ne akvo en
Ĉi tiu estus jen.
Vivállerallál-lerállerallá,
Viválleralláll erallá!

5. Ho, karaj fratoj, estas ne
Plu klara pens' en mi;
Mi havas la impreson, ke
forlasis min raci'.
Tordiĝas miaj sensoj kvin
Kaj tio konfuzigas min.
Vivállerallál-lerállerallá,
Viválleralláll erallá!

6. Plenigu por mi drinkemul'
La glason ree vi!
Ĝin notu, mastro, sur tabul',
Pruntita estu ĝi.
Mi lasas mian ĉapon kun
promes' de posta pago nun.[2]
Vivállerallál-lerállerallá,
Viválleralláll erallá!

...

[2] aŭ:
Kaj prenu mian ĉapon ĉi,
Ĝi estu via garanti'

*Traduko de la Germana poemo "Studentenlied" de N. N. 11 en Esperanton de* Ludwig Emil Meier *(∗1847-02-16 – †1919) en 1907.*

*Arg-389-766 (2007-03-18 11:59:11)*

*La originan germana-lingvan tekston de tiu ĉi kanto mi, Manfred Retzlaff, elprenis el la retejo de sinjoroFrank Petersohn* `http://ingeb.org/Lieder/ichhabde.html` *. Tie estas indikite, ke la dua kaj la tria strofoj estas antaŭ la jaro 1794 verkitaj de Joachim Perinet (1765-1816). Vidu ankaŭ:* `http://www.markomannia.org/index.php?target=liederbuchlied&liedid=284` *. La esperantigon mi trovis en la kant-libreto "Esperantista kantaro", kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, verkisto. La kantlibro estas eldonita en 1907 de la eldonejo Hans Theodor Hoffman, Berlin W 35, Steglitzer Straße 44. (Sur la paĝoj 9 kaj 10 de tiu kant-libreto estas intershanĝitaj la strofoj 3 kaj 4, kompare al la origina germana teksto. Mi re-interŝanĝis tiujn.) La melodio de la kanto estas indikita en ambaŭ retejoj en formo de midi-dosiero.*

*Traduko de la Germana poemo "Studentenlied" de N. N. 11 en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2007-03-20.*

*Arg-389-767 (2007-03-23 11:43:37)*

*La originan germana-lingvan tekston de tiu ĉi kanto mi, Manfred Retzlaff, elprenis el la retejo de sinjoroFrank Petersohn* `http://ingeb.org/Lieder/ichhabde.html` *. Tie estas indikite, ke la dua kaj la tria strofoj estas antaŭ la jaro 1794 verkitaj de Joachim Perinet (1765-1816). Vidu ankaŭ:* `http://www.markomannia.org/index.php?target=liederbuchlied&liedid=284` *. La melodio de la kanto estas indikita en ambaŭ retejoj en formo de midi-dosiero.*